5-a Jaro. N-o 222 APERAS  SEMAJNE 3. Januaro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA AMERIKA DANĜERO

Sub la jugo de arbitraciuloj

Ŝajnas fariĝi internacia modo, ke larĝaj laboristaj amasoj devas klini sin sub la juĝon de personoj, kiuj, pro la internacie superreganta forto-proporcio, laŭ kiu la kapitalistoj estas la neĝenataj mastroj, — preskaŭ ĉiam favoras la posedantan klason.

Ĵus venis la raporto, ke la germana Ruhr-regiona laboristaro per sia reprezentantaro akceptis senkondiĉe decidon de arbitraciulo, kiu baldaŭ juĝos. Pri kio? Pri la decido, laŭleĝe donita, ke la laboristoj ricevu salajraltigon! Tiu ĉi leĝa decido estis ignorata de la entreprenistoj, kaj la laboristoj estis lokaŭtataj dum semajnoj. Nun la mastroj permesis al la laboristoj reveni en la fabrikojn. La juĝo ankoraŭ ne estas konata, sed la laboristoj jam laboras. Ili fidas al sia arbitraciulo. Sed ĉu la remalfermo de la fabrikoj ne pruvas la bonajn esperojn de la entreprenistoj? Nu, ni aŭdos.

Tiu ĉi supra procedo estas rekonebla kopio de usona originalaĵo. Usono fariĝis la modelo por ĉiuj landoj en la mondo. Sed la pli granda influo de la laboristoj en aliaj landoj ne malbonigas la imitaĵon; tie ĝi konservigas ankoraŭ iom da espero, dum ĉi tie (t. e. en Usono. — Red.) la arbitracia juĝo ĉiam metas kapitalistan kalkanumegon sur la nukon de la laboristaro.

La fervojistaj unuiĝoj (aniĝintaj ĉe Amerika Federacio de Laboro) — por citi ekzemplon — konsentis pri estonta reguligo de salajro kaj laborkondiĉoj per "urĝeca helpkomitato" enoficigota en okazo de bezono fare de la prezidanto de Usono. Jes, vere, de la prezidanto de Usono! . . .

Tiu ĉi konsento estis donata per alpreno de la alcelita prifervoja laborleĝo. Jam nun la fervojistaro devas penti pri la fordono de sia batalrajto. La fervojistoj devis ĵus akcepti nesufiĉan salajr-altigon, kontraŭ kiu ili voĉdonis je 90% por striko. Montriĝas, ke la leĝo signifas diafane vualitan kapitalistan diktatorecon.

Al la ĝenerala formo de la koncerna leĝo estis donata la konsento post serio da interkonsiliĝoj fare de fervojaj ĉefoj kaj la gvidantoj de kelkaj unuiĝoj. Kiam la leĝpropono estis prezentata al la Parlamento, leĝista reprezentanto, kiu parolis en la nomo de 20 unuiĝoj, povis aserti, ke la projekto havas la subtenon de 1 750 000 da fervojlaboristoj. Pri la miliono kaj multegaj miloj da fervojistoj, kiuj neniam aŭdis eĉ unu vorton pri la leĝo, li ne bezonis paroli, ĉar ili estas mutaj suferantoj, t. e. ili ne sciis pri la afero, kaj se ili scius, eĉ la plejmulto ne zorgus pri la konsekvencoj.

Prezentiĝas sekvantaj instruoj al ni. Ne nur en unu lando arbitracio estas aplikata, kiel bonega ilo de klasharmonia kunlaborado, ĉiam kaj ĉie nur por la granda malprofito kaj malutilo al la laborista klaso. Kiam la arbitraciulo favoras la laboristojn, la kapitalistoj simple ignoras la arbitraciulon, eĉ kontraŭstaras la demokrat-ŝtatan aŭtoritaton, kaj puno ne trafas ilin. Sed kiam la juĝo favoras la posedantan klason, tiam la laboristoj devas klini sin ĝis plej sube. Ĉi tiu internacia modo elpostulas maldormeman priatenton, forigon de la pasiveco, revekiĝon de la vólo al klasbatalo.

Kontrakto rompita, laboristoj punitaj

La kontrakto estas sanktaĵo, kiun respektegas la unuiĝa (sindikata) ideologio kvazaŭreligie kaj la kapitalistoj laŭbezone.

Okazis, ke en la posedon de laktprodukta kompanio estis alproprigataj du fabrikoj. En la du novaj fabrikoj la laboristoj estis ne-unuiĝanoj, dum en la malnovaj la unuiĝo estis kontrakte agnoskata[1]. La laboristoj postulis agnoskon de la unuiĝo ankaŭ en la du novaj produktejoj, kion la kompanio ignoris, tiel ke fine la laboristoj ekstrikis.

Tiun ĉi strikon la alvokita juĝisto nomis kontraŭleĝa kaj decidis, ke la unuiĝo pagu monpunon de 60 000 doloroj. Li ankaŭ deklaris ĉiun unuopan membron respondeca, kio signifas, ke ĉiu laboristo devas kontribucii, ĝis la "modera" sumo estos pagita.

Tuj post la juĝo la kompanio reduktis la salajron je la duono por enkasigi la "kompenson pro perdo de klientaro". Tiam la laboristoj rifuzis labori, sed nun akceptis kompromison, laŭ kiu la unuiĝo tuj pagos 5000 dolarojn, kaj poste la kompanio rajtas depreni de la salajro posemajne 3 dol., ĝis la sumo de 35000 dol. estos pagita.

Ankaŭ ĉi tiu batalilo, laŭ raportoj, estas aplikata en diversaj landoj, batalilo el la arsenalo de usona kapitalistklasa justeco. La usona danĝero ŝteliras trans la terglobon.

La patriota Federacio de Laboro

En Nju Orlins (angle: New Orleans) okazis la 48-a kunveno de la Amerika Federacio de Laboro. Unu tago estis

[1] Rekonata.

701.820 - D. Esp. M
5
1929

dediĉata al aŭskultado de paroloj pri patriotismo kaj defendo de l' patrio. La komandanto de l' Amerika Legio (faŝistaro) alparolis la kunvenintaron, laŭdante la Federacion, kiu efektive defendas la amerikajn instituciojn kontraŭ radikalismo kaj komunismo, kiujn lastajn li nomis mortintaj. Kaj li pledis por pli granda ŝiparo, pli bone preparenda armeo, ĝenerala mobiliza leĝo kaj batalpreteco kontraŭ malhonoraj konkuraj nacioj.

La delegitoj leviĝis entuziasme, aplaŭdante per ĝojkrioj.

Kaj kiam la fratdelegito de l' Britia fervojistaro nomis la militojn "kapitalistaj, ĉu estas en la lando de venkinto aŭ venkito" kaj admonis, ke "militoj estu malsukcesigotaj per unuigota laboristklasa solidareco", tiam la tuta kunvenintaro ĝentile, sed kun frosta muteco, aŭskultis . . .! —

Fantomo leviĝas, milito minacas, pli giganta, kruela, terura ol la pasinta. Britlanda laborista gvidanto malbonaŭgure avertis kaj petis: "Donu la manon nun, fratoj", sed la laboristaj gvidantoj usonaj restis mutaj, senmovaj . . .

Ĉu mutuloj en tiu ĉi okazo ne parolas tre minacan lingvon? Ĉu ne ĉiu racie pensanta samtempulo time konscias, ke du mondimperioj armadas febre unu kontraŭ la alia? La okazoj fingromontras en la profundojn, el kiuj ĉion detruonte minacas eliĝi la Usona Danĝero.

Ino-Kor (SAT-ano 1307).

VIZITO ĈE TOM MUNI[1]

Je la fino de tre agrabla veturo ĉirkaŭ San Francisko-Golfo staris antaŭ ni la grizaj muregoj de l' San Kŭentin[2] — malliberejo. La pordegoj estis malfermitaj por ni, ĉar ni posedis leterojn de la gardisto, kiu permesis al ni viziti Tom Muni. En la oficejo de la gardestro ni ricevis permeson por ankaŭ viziti Mat Ŝmit[3]. Tion suggestis al ni amiko, kiun ni vidis la antaŭan vesperon.

Ni atendis en la vizitantejo, ĝis niaj nomoj estis vokataj. La ĉambro estis tute plena de parencoj kaj amikoj de malliberuloj — plej virinoj, atendante siajn vicojn. La pordo al pli interna ĉambro estis malfermita kaj donis al ni oportunan okazon ekvidi la renkontojn inter patrinoj, edzinoj kaj fratinoj kun iliaj viroj.

Kiajn suferadojn, malbontraktojn kaj tragediojn ĉi tiu ĉambro povus rakonti! Kiaj dramoj estis kaŝitaj sub la kisoj, korŝiraj kiel ordinaraj.

Baldaŭ niaj nomoj estis vokataj, ni eniris la ĉambron kaj sidiĝis apud longa tablo. Aliflanke de ĉi tiu tablo post malalta intermureto la malliberuloj sidis. Ŝmit estis la unua, kiu envenis, bela figuro, brilokula kaj kora. La longaj malgajaj jaroj postlasis videblan impreson sur li, depost la fama Mk-Namara-afero, en kiu li estis implikita.

Ne estas multe, kion li ne scias pri maŝinaro. Li havas plaĉan laboron, iom da libereco por ĉirkaŭiradi en la ejo kaj multe da "sala" filozofio por subteni sin. Nun li salutis nin: "Vi forlasis la preĝejon por trovi liberecon, kaj mi devis veni al la malliberejo por trovi solidarecon." Li pensas, ke malliberejoj ne multe povas esti plibonigotaj, ne farante ilin pli bonaj ol la malliberejo de laboristmondo ekstere. La vojo al libereco estas, ke ni ne timu la malliberejon. "Mi povas paroli pli libere ol vi. Kion ili povas fari? Malliberigi min?"

Al la nuna laborista movado kaj ĝia gvidistaro, escepte kelkiuj, li nur malmulte konfidas. Jes, li scias, kio okazas, ĉar li ricevadas librojn kaj aliajn literaturaĵojn en la malliberejo, kvankam estas pli malfacile nun, ĉar ia kondamnita baptista predikisto memfaris sin cenzuristo pri la bolŝevika literaturo. Ŝmit havas multajn planojn por la nova maŝinaro en la jutofabriko, kiujn li estas desegnanta. Li mokas la kompatindajn impostpagantojn kiuj pagas por tio kaj pagas la elspezojn por enkarcerigado de kapablaj fortaj viroj.

Link'n[1] Steffens defendas lian proceson, kaj kelkaj signoj promesas pardonon. Unu Mk-Namara estas libera kaj la alia estas la plej maljuna en la malliberejo.

Tiam Muni aperis. La aliaj malliberuloj estis vestitaj en ne malbone aspektantaj grizaj uniformoj, efektive en San Kŭentin-malliberejo kiel en aliaj malliberejoj oni observas, ke la malliberuloj eĉ pli bone aspektas ol la gardistoj. Muni estis vestita en blanka vestaro. Li aspektis bone kaj marŝis vigle, kvankam li jam estis fastanta tri tagojn. Li periode fastas, ĉar li esperas tiele plej efektive saniĝi de ia infekto, kiu preskaŭ ebligis al morto malfermi la pordegojn de lia malliberejo antaŭ la malrapidemaj decidoj de la juĝistaro.

Li vivas por ricevi justecon. Oni diras, ke Tom Muni estas akremulo, netakta kaj neracia. Ili diras, ke li devus akcepti pardonon, sed estas ankoraŭ necerte, ke ĝi estos donata. Li ne volas demandi ĝin. Senkulpa, kia li estas, li ne deziras limigitan liberecon. Mi diras al vi, la kuraĝo kaj espero de Tom Muni estas mirinda. Ne estas tre laŭdinde fare de radikaluloj ke ili trovas tempon por kritiki ĉi tiun Amerikan Drefŭs[1], de kiu estas forrabita nun dekunu jaroj da libereco en societo, kiu scias almenaŭ naŭ au dek jarojn, ke li estas sendube nekulpa. Ilia tuta tempo de kritiko devus esti utiligata por kontraŭbatali tiun ĉi teruregan maljustecon.

Pri la krimo de l' ekzekuto al Sako kaj Vancetti, guberniestro Fulla[2] kaj liaj subtenuloj povas pretendi aŭ vere kredi je la kulpo de tiuj ĉi du italoj. La Centralia-viktimoj pafis, sed pro memdefendo. Sed ke Muni kaj Billi povus esti kulpaj, nenia inteligenta persono kredas. Iliaj kolegoj estis liberigataj. La falsĵura atesto kontraŭ ili jam delonge estas konfesita. La juĝantaro kaj persekutinta prokuroro kune petis pardonon por ili. Juĝisto Franklin A. Griffin, kiu kondamnis ilin, estas unu el la plej fervoraj laborantoj por ilia defendo.

Nuntempe Muni havas novan esperon. La kvazaŭ progresema guberniestro Jang[3], politika protektato de Hajr'm Ĝons'n[4], akceptis komitaton kaj aŭskultis la buŝajn argumentojn. Li ankaŭ posedas kompletan procespaperaĵon, kiu inkludas konvinkajn leterojn de Kler'nc Dero[5] kaj la juĝisto, el kies kopioj Mune laŭtlegis. Organizita laboro ankaŭ aktiviĝas denove post apatio, kiu eĉ, se pli bonsigna ol Mune pensas, nur bedaŭrinde spegulas ne nur la politikan malforton de iaj memfieraj gvidantoj, sed ankaŭ la indiferentecon por justeco, percipe kiam la viktimo de l' maljusteco povus esti embarasa por ili, kiam li estus libera.

Mi mem estas iomete pesimista. La kompleta silento de Hajr'm Ĝons'n dum ĉiuj tiuj jaroj estas malbonsigna. Guberniestro Jang havis pli ol sufiĉe da tempo por agi. Eĉ kvankam ili estas senkulpaj, Mune kaj Billi estas agitistoj, kaj la Kaliforniaj komercaj interesoj preferas, ke ili restu en la malliberejo. Estas pli facile teni ilin ol kapti ilin denove. Por venki tiun abomenindan sintenon, ni postulas la helpon de l' informita kaj konvinkita publika opinio. Mune eltenas pli bone la malliberejon ol ni la ideon, ke li estas tie.

Lando, kiu tenas en la malliberejo Mune kaj Billi post la okazinto de Sako kaj Vancetti estas lando sen elementa scio pri la signifo de justeco. Estas ankaŭ alia aspekto al ĉi tiu demando. La samaj akvoj, kiuj lavas la grizajn fundamentojn de San Quentin, ankaŭ lavas la marbordojn de Palo Alto, kie staras la belega bieno de Herbert Huver[6].

---

[1] Angle: Mooney. [2] Angle: San Quentin. [3] Germ.: Schmidt.

[1] Angle: Lincoln.

[1] France: Dreyfus. [2] Angle: Fuller. [3] Angle: Young. [4] Angle: Hiram Johnson. [5] Angle: Clarence Darrow. [6] Angle: Hoover.

La Prezidanto de Usono ne povas pardoni al Mune. Sed kiam kandidato por tiu ofico estas kaliforniano, preskaŭ najbaro apud la malliberejo kaj tute informita pri ĉiuj faktoj per Mune mem, tiam neniaj politikaj motivoj aŭ leĝa evitado povas senkulpigi lian silenton.

Ni rajtas scii, kiel respublikestro reagos al ĉi tiu homa problemo, se li restas tiel silenta kaj rezigna pri ĉi tiu terura krimo kontraŭ amerika libereco, kiel li estis pri la petrol-skandaloj.

Norman Tom's (angle: Thomas)
El La Nacio (angle: The Nation) Nov-Jorko trad. G. J. Kroes.



FAKTOJ KAJ KOMENTOJ

Nacia idolo

En la agemaj rondoj de Italio oni nun klopodas por doni al la lando nacian sanktulinon, kiu, laŭ la ekzemplo de Johanino d' Ark (france: Jeanne d'Arc) por Francio, simboligus la aspirojn kaj la altan idealon de l' itala popolo. Tiucele oni fondis lastatempe la t. n. societon de "Katerinanoj", kiu hodiaŭ jam entenas en siaj vicoj prelatojn, profesorojn, diplomatojn, registaranojn, senatorojn kaj eldonas specialan revuon kaj organizas serion da kunvenoj. Ĝi celas ekflamigi la entuziasmon de l' italoj por la persono de l' sankta Katerino de Sieno. En la urbo Sieno oni komencis instali universitatan katedron cele de studoj speciale dediĉitaj al la sankta Katerino.

Jen, kiel artifikuloj eltrovas ĉiam novajn rimedojn, por pliardigi la patriotan flamon! Kiel novan instrumenton por vigligi la nacian senton, oni elfosas el la historio "sanktulinon", per gloregado trudante ŝin al la popolo kiel nacian idolon! Ĉu oni povus trovi pli trafan argumenton por montri, ke la patriotismo estas religio kaj la patriotoj — religiuloj?

LA NOVA EPOKO
Monata organo de Sennacieca Asocio Tutmonda
Literatura Serio
Enhavtabelo de la decembra kajero:
M. GORKI: Tunelo. El rusa trad. G. Demidjuk. — E. VARNAI: Floro en soprano. Versaĵo. El hungara trad. Julio Baghy. — C. LEWTON BRAIN: La prezo de hundino. El angla trad. H. Stay. — DEMETRIO ALBANOV: "Kiz toji." El serio "Turkestanaj rakontoj" Originalo.
Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.
Poekzemplera prezo: **0.35 mk. g.**

DISKUTEJO

En nia argumentaro por neakcepto de la programprojekto prezentita ĉe la VIII SAT-Kongreso troviĝas jeno: "... unu grava motivo por ne akcepti ĉi tiun programon aŭ alian, kiu povus esti pli bona, pli adekvata, estas la fakto, ke la grandega plimulto el niaj anoj tute ne interesiĝis pri la demando ..."

Neniu kontraŭdiras al tio kaj sekve la akcepto de Programo en tiaj kondiĉoj havus nenian praktikan signifon, ĉar estas evidente, ke homoj ne povas senti sin morale devigataj per akcepto de dokumento, kiun ili ne serioze studis.

La Kongreso vokis al ĉiuj SAT-anoj, ke ili studu kaj diskutu la programaferon. Sekve de tio ni malfermas sur la paĝoj de "S-ulo" diskutadon, publikigante en ĉi tiu n-o la unuan materialon pri la temo.

Kvankam la emo ne mankas al ni tuj refuti la vidpunkton ĉi sube prezentitan, ni preferas tamen prokrasti kaj lasi unue al la legantoj la zorgon eltrovi mem, kie troviĝas la "sofismoj" kaj "artifikaĵoj".

Ni faru simple unu rimarkon: K-doj Drezen, Modenov, Ĵavoronkov, Breslaŭ kaj Jodko tute ne defendas la projekton de programo prezentitan en Göteborg; ili eĉ ne diras, ke SAT devas havi jam nun kompletan Programon kaj kontentiĝus per tio, ke oni akceptu prilingvajn tezojn, ellaboritajn de la Lingva Komisiono de SEU. Ili ne defendas la "Programon" prezentitan de K-do Muravkin je la nomo de Programkomisiono, sed ili profitas la okazon por kulpigi la Direkcion de SAT pri ni ne scias kia "reviziado" — Reviziado de kio? eble de tio, kio ne ekzistas! ... Temas ja doni al SAT Programon k tio signifas, ke ĝi ne ankoraŭ havas. Ĉu ni proponis revizii la bazprincipojn metitajn en nian Statuton ĉe la fondo de SAT? Tute ne! Sekve kion signifas tiaj senbazaj kritikoj? Ni volas esperi, ke niaj K-doj tiom ekscitiĝis nur ĉar ili miskomprenis la ĝustan signifon de niaj "rimarkoj".

La aktivaj SAT-anoj havigu al si nepre la Protokolaron de la VIII. Kongreso kaj la broŝuron La Laborista Esperantismo. Ili serioze kaj atente studu tiujn dokumentojn; ili komparu, pripensu; ili kontrolu ĉu niaj "rimarkoj" respondas aŭ ne al faktoj; ili mem serĉu la aluditajn tekstojn ktp. Ni ne dubas, ke post tiu serioza esploro ili alvenos mem al la samaj konkludoj, kiujn ni faros ĉe la fino de la hodiaŭ komenciĝanta diskutado.

La debato estas malfermata. Ni esperas, ke ĝin partoprenos multaj K-doj. Ĉiu penu verki kiel eble plej koncize kaj objektive.

DIREKCIO DE SAT.

* * *

PRI PROGRAMO KAJ PRI SENPROGRAMECO

En la "protokolaro de la VIII. kongreso" estas presita projekto de "Programo de SAT" kun rimarko, kiujn k-do Lanti estis komisiita de la Direkcio prezenti al la kongreso.

La kongreso rekomendis al ĉiuj SAT-anoj studi la ellaboritan projekton kaj poste, laŭ propono de k-do Lanti, voĉdonis, "ke SAT havu programon, kiu ebligos al anoj de ĉiuj klasbatalaj organizoj aliĝi al SAT".

Atenta studado de la programo kaj de la rimarkoj faritaj instigas nin paroli pri du punktoj: 1. pri fundamenta ŝanĝo de la eventuala program-enhavo, kiu devas limigi sin nur per argumentado pri lingva (parto A de la prezentita program-projekto) kaj 2. pri absoluta senprogrameco de plej multo el la rimarkoj — vere ĉagrena ĉe Direkcio de organizacio, pretendanta esti laborista kaj klasbatala.

Pri la unua punkto:

Ĝuste konstatis la rimarko unua (laŭtlegita dum la kongreso), ke la tezoj pri "historia neceseco de lingvo universala" — "tute ne preparas la spiriton al la akceptado de artefarita lingvo".

Ni notu, ke argumentado prilingva estas por SAT-programo speciale grava, ĉar tiu argumentado estas ja nura apartenaĵo de SAT. La programoj de aliaj laboristaj organizacioj povas havi multon komunan kun la SAT-programo, sed nenion komunan ili havas ĝis nun kun tiu parto de SAT-programo, — kiu traktos problemon mondlingvan.

Tial ni insistas, ke tiu parto de la programo estu ellaborita plej serioze, estu diskutota kaj akceptota ĉe la proksima IX. SAT-kongreso.

SAT-anoj, simplaj laboristoj, estas ne ĉiam sufiĉe lertaj, por ke ili povu prezenti ĝustan argumentadon porlingvan al siaj profesiaj, partiaj organizacioj, al ĝiaj gvidantoj kaj al teoriistoj de l' laborista klasmovado.

Fiksa kaj teorie senriproĉa programo pri-lingva multe helpos al propagando de internacielingvaj ideoj en rondoj laboristaj kaj ĉe ideologoj de tiuj rondoj.

Tial ni proponas ke la SAT-kongreso diskutu kaj eventuale ekceptu tezaron "Vojoj de formigo kaj de disvastigo de la Lingvo internacia", kiun aprobis la Lingva komisiono de SEU, kaj kiun akceptis la IV. kongreso de SEU.

Traktante problemojn pure lingvajn, tiu tezaro estas akceptebla de ĉiuj laboristaj organizaĵoj — sendepende

Kial ni devas legi? Por pligrandigi nian scion, forigi niajn antaŭjuĝojn kaj daŭre en pli alta grado estiĝi karakteroj.

Georg Brandes.

de iliaj politikaj tendencoj kaj de ilia taktiko.

Tiu tezaro esploras problemojn: 1. pri lingvo tutmonda kaj lingvo internacia, 2. pri lingvo, kiel socia interkomprenilo, 3. pri fundamentaj elementoj de la eventuala lingvo internacia, 4. pri variaj projektoj de L. I., 5. pri kaŭzoj de komenca esperanto-disvastiĝo, 6. pri grado de teoria kaj praktika supereco ĉe esperanto kaj ĉe aliaj mondlingvosistemoj, 7. pri L. I. kiel p r o d u k t o d e k o l e k t i v a k r e a d o, 8. pri rolo de aliaj projektoj de L. I. ĉe plua kolektiva pliriĉigado kaj perfektigado de esperanto.

Solvinte tiujn problemojn, la tezaro respondas al jenaj konklud-demandoj: 1. ĉu estas eble anstataŭi esperanton per iu alia sistemo de L. I., 2. ĉu estas eble enkonduki kaj fiksi per dekreto iujn difinitajn formojn de L. I., kaj 3. kiaj estas la eblaj rimedoj por helpi al progreso kaj evoluo de L. I.

Ni speciale konstatas, ke konsiderante lingvon (eĉ internacian) kiel produkton de certa kolektiva kreado, la tezaro adaptiĝas al plej modernaj materialistaj lingvo-teorioj (ekz. al la jafetia lingvo-teorio de N. Marr). Tiuj ideoj ĝis nun estas ĉe esperantistoj malmulte konataj, malgraŭ tio ke ili estis konfesataj de Zamenhof mem. La rimarko 7-a montras, ke klara kompreno pri tio ne ekzistas eĉ ĉe SAT-direkcio.

Nun tiu tezaro estas tradukata esperanten. Ni esperu, ke vasta koniĝo kun ĝi antaŭ la kongreso konvinkos kamaradojn SAT-anojn, ke tiu tezaro estas grava teoria dokumento, sur kies bazo devas esti starigata la tuta porlingva agado kaj la tuta porlingva sintenado de SAT.

Nun ni transiru al la d u a p u n k t o — senprogrameco kaj senprincipeco elmontrita de la SAT-direkcio.

Ni konsentas, ke eble ne venis tempo, por ke SAT klare fiksu siajn celojn kaj organizprincipojn klasbatalajn (ĝi ja nomiĝas organizacio klasbatala), sed tamen plej energie ni protestas kontraŭ tio, ke la SAT-ana gvidantaro tiel senĝene reviziu la tutan idean fundamenton de SAT, kiel ĝi tion faris.

Ni bedaŭras, ke tiuj rimarkoj (escepte la rimarkon pri la 1-a ĉapitro de Programo) ne estis laŭtlegitaj dum la kongreso. Pro tio la kongreso mem ne sukcesis doni la necesan kondamnon al la metodoj argumentadaj de la SAT-Direkcio.

Preskaŭ ĉiuj rimarkoj de la Direkcio, traktantaj pri la celoj kaj organizprincipoj, starigitaj en la Program-projekto, — montras tendencojn danĝerajn, eĉ tiam, kiam ili kritikas formale apartajn frazojn de la Program-projekto. Argumentado formala kaj plene sofista troviĝas ekzemple en la 4-a rimarko: nur plej neserioze oni povas fari konkludojn el la teksto de la programo, celante klasbatalajn kaj klaskonsciajn laboristojn, ke ili devas subteni imperialismon.

Same formala estas la kritiko, entenata en la rimarko sesa. La natura procedo de intermiksiĝo kaj asimiliĝo de homoj havis kiel kaŭzon ofte la imperialismon, sed eĉ la imperialismo ja ĉe ia grado de ekonomia evoluo estas sekvo tute natura. La punktetoj ĉe la fino de la rimarko eble volas ion aldoni al la kritiko, sed tiun kritikan penson kompreni ni ne povis. Mokintenca ŝajnas la rimarko 12-a, kie oni batalon por virina egalrajto unue konsideras politika (do ĉe SAT malpermesita) kaj due — egaligas ĝin al tendencoj hermafroditismaj.

Sed tiuj formalaj kritikoj estas fakte senkulpaj kaj eĉ diskuteblaj. Multe pli malagrablaj kaj absolute senprincipaj estas kelkaj aliaj kritikaj rimarkoj.

En la 2-a rimarko oni revizias principan aserton, ke proletaro (en landoj kapitalistaj) ne havas partolandon".

Per citaĵoj el Jaurès kaj Bacon oni volas sugesti, ke konsekvencaj socialistoj ne povas aliĝi al SAT, se SAT principe konsentas kun esprimo de Marx. La rimarko volas esti pli kategoria ol Jaurès, ĉar tiu ja diris nur, ke "la ideo pri patrio — ne estas ekskluzive ekonomia". Tiu aserto eĉ de lingva (semantika) vidpunkto estas plene akceptebla. La tuta rimarko estas nura ĵonglado per vortoj, ĵonglado, kiu devas fuŝi klarecon de la SAT-ana principaro nuntempa.

La rimarko 10-a kontraŭparolas la tendencon, ke SAT agitu kontraŭ imperialismaj militoj kaj kolonia subpremado.

Rimarkantoj konstatas, ke tiu postulo "liveros al niaj komunistaj k-doj la rajton batali kontraŭ la socialistaj k-doj". Nu, ni ne volas kredi, ke iu sincera socialisto-laboristo estu por imperialisma milito kaj kolonia subpremado. Se tiaj estus, kontraŭ tiuj iliaj tendencoj ni nepre batalos. Cetere montru la Direkcio de SAT iun dokumenton socialistan, subtenantan la imperialismon aŭ kolonian subpremadon. Ŝajnas ke la Direkcio en sia reviziado de la SAT-idearo iras multe pli malproksimen ol permesas la nomo de "klasbatala laborista asocio".

La rimarko dektria protestas kontraŭ la aserto, ke SAT estas unuecfronta organizacio. Oni timas la vorton kaj proponas anstataŭi "unuecfronton" per nova "superpartia unueco". SAT-anoj klaskonsciaj interkonsentis pri iuj punktoj, neniel kontraŭaj al oficialaj programoj de siaj partioj. Se nun la reviziaj tendencoj fariĝas tiel gravaj, ke oni volas eviti en "klasbatala organizacio" ĉian konfeson de certaj klasidealoj, — la Direkcio riskas konduki SAT al formoj de malnova UEA.

Tion ni nek volas nek povas akcepti.

Ĉe la fino ni citu kun granda ĉagreno[1] el la rimarko 2-a jenajn vortojn de k-do Lanti: "mi ne opinias esti pli liberpensanta homo ol la fama kristana anarkisto — Tolstoj".

Se efektive la SAT-gvidantoj ne volas sin levi super la reakcia filozofio de Tolstoj, kiu propagandis ekstermon de ĉia kulturo, de ĉia industrio, revenon al pranatura vivado kaj eĉ ĉesigon konscian de la homar-ekzisto, — tiuokaze ni devas konstati, ke SAT perdas sian karakteron de progresema laborista organizo, tiam ni devas konstati, ke niaj vojoj fariĝas tute malsamaj.

Tamen ni volas ankoraŭ esperi, ke la Direkcio de SAT, celante kritiki la prezentitan programon, senpripense uzis argumentojn, kiujn ĝi ĉe bona pripensado evitus.

Ni konsentas, ke la tuta SAT-programo por la komenco enhavu nur deklaracion pri la Mondlingva problemo, ni ne insistas, ke estu fiksitaj iuj politike-sociaj celoj ekster tiuj, kiuj troviĝas en la statuto de SAT kaj en la menso de ĉiu SAT-ano de la jaroj unuaj. Sed tia kritikado kun plena reviziado de la ĝisnuna SAT-agado estas nek allasebla nek inda.

Restu ĉe SAT-anoj sennaciismo kiel plej bona formo de internaciismo, restu ĉe ili la celado kontraŭ imperialismo kaj koloniaj militoj, restu celado por egalrajto de virinoj, kaj fine restu unueco internacia, — restu eĉ la unueca fronto, kiun malgraŭ ĉiuj artifikaĵoj de Direkciaj rimarkoj ni ĝis nun sukcesis sur bazo de nia statuto kaj de niaj klas-celoj bone realigi.

Kun salutoj

E. D r e z e n (1518), N. M o d e n o v (4834), V. J a v o r o n k o v (4174), B. B r e s l a ŭ (1894), A. J o d k o (128).

[1] Mi tre kompatas tian grandan ĉagrenon! Sed estas ja vere, ke mi havas la opinion, ke Tolstoj estis tre memstare pensanta homo. Liaj kritikoj kontraŭ la ortodoksa religio, kontraŭ la patriotismo, kontraŭ la ŝtato ktp. pruvas tion plej nerefuteble. Estas certe ateistoj, kiuj ne tiom "liberpensas" kiom Tolstoj. Sed se mi havas tian opinion pri la fama aŭtoro, cetere honorata de la Sovetia Potenco mem, ĉu tio signifas, ke mi konsentas kun li pri ĉio? Tute ne. Kiu kompreneme kaj atente legis miajn artikolojn, tiu scias tre bone, ke mi oftege laŭdis la teknikon; oni eĉ riproĉis, ke mi eble troigas tiurilate. Sekve, kion signifas tiu "granda ĉagreno"?

Mi petas senkulpigon pri tiu persona rimarko, sed ĝi estis necesa, por vidigi pli klare la eraran spiriton, laŭ kiu estis verkata la tuta jena kritikaro. E. L.

Kion ni devas legi? Tiujn librojn, kiuj aludas kaj kaptas nin, ĉar ili ĝuste taŭgas por ni. Tiaj libroj estas por ni la bonaj!

G e o r g B r a n d e s.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 1 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 1

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

Kristo la laboristo

Antaŭ nelonge 33 kardinaloj kaj 550 episkopoj petis la papon, enkonduki novan feston kun la nomo "Kristo la laboristo". Antaŭ kelkaj jaroj oni ankoraŭ diris "Kristo la reĝo". Oni ekkonas la interrilaton de religiaj formuloj kaj sociaj statoj. La reĝoj perdis sur tero sian valoron. La lastaj restaĵoj de feŭda epoko ekzistaĉas inter la diktatoreco de l' bankkapitalo. Nur kelkaj malspiritaj monarkistoj povis opinii, ke la popolo en memoro pri la bona malnova epoko reaktivigus la sentronigitajn princojn. La feŭdismo mortis; la burĝa kapitalo venkis super la feŭda grundrento; la regantoj de dia favoro notiĝas ĉe la burĝa borso sub "pari"; ne plu rekompencaŝ sin ilin financigi, ĉar oni ne estas pagata per "animaj afektoj" de la mobilizita popolamaso. La majesto fariĝis figuro por vakspupejo; la "patro de l' lando" polvokovrita muzeaĵo. Kristo la reĝo perdis sian sencon.

Novaj sociaj problemoj ekestas kaj postulas religian aliformigon. La papo Leo XIII. elparolis ĝin en sia cirkulero pri la laborista demando (Rerum Novarum 15. 5. 1891):

1. La laborista demando staras en unua vico de nia tempo.

2. La demando estas malfacila, tamen ĝi povas kaj devas esti solvata.

Kaj la papo proklamas: 1. Per laboro la homo akiras rajtojn. — Certe estos 2. Laboro kaj mizero ĉiam sur tero. — Sed 3. La dogmo de alia mondo pacigas (!). — 4. Sen la eklezio solvo ne estas ebla. — Ne la socialismo sed 5. La eklezio proklamas la ĝustan doktrinon pri mono kaj kapitalo. — 6. La laborista klaso ricevas helpon de la eklezio; ĝi ekkonas en la laboristo la homon kaj la infanon de dio.

Kaj la papo admonas la ŝtaton, ke ĝi ankaŭ helpu ĉe la solvo de la laborista demando:

1. La ŝtato zorgu egale por ĉiuj, ankaŭ (!) por la laboristoj.

2. La ŝtato devas plibonigi la mizeran staton de la proletoj. (!)

3. Ĝi devas ĉesigi la strikojn aŭ, kio estas pli bona, ilin forigi. (Vidu Anglion kaj Italion.)

4. La deviga dimanĉripozo estu leĝe destinota kaj police kontrolota.

5. La ŝtato devas subpremi fiprocentegadon.

6. La paga demando estu reguligota en kristana senco.

Vidu, proletŝafo, kiel bone la eklezio zorgas pri vi! Se ne estus la eklezio, vi ne havus vian dimanĉripozon. Kaj por kristana pago ĉiam pledis la eklezio, precipe por — la alta salajro de ĝiaj episkopoj.

Kaj la papo postulas plie:

1. Estas organizendaj laboristaj organizoj.

Kompreneble ne la malbenitaj socialistaj organizoj, sed

2. Malbonaj societoj estu malpermesotaj. (!)

3. La celadoj, krei harmonion inter laboristoj kaj entreprenistoj, estas laŭdindaj.

4. La religio estu la fundamento!

Kio estas do kulpa pro ĉiuj mizeroj? La senreligieco. Proletŝafo, vi devas esti bona ekzemplo por la kapitalisto! Reiru en la eklezion, kiu varme zorgas pri vi. Laboru kaj preĝu! Tiam ankaŭ la kapitalisto estos kortuŝita kaj estos kristeca kaj ne plu ekspluatos vin!

Sed se vi helpos al vi per klasbatalo, tiam ankaŭ la kapitalisto povas koleri kaj uzi perforton. Kiu prenas la glavon, pereos per la glavo. Nur per amo povas esti savata la mondo. Enviciĝu en la de dio volita sociordo. Produktu plusvaloron kaj montru vian kristanan humilecon kaj sklavecon per pliigo de la profito. Tiam ankaŭ vi ricevos la kristanan parton de tiu ĉi profito. Kristo montris al vi la vojon. Li zorgis pri penegantoj kaj ŝarĝegitoj; li predikis kontraŭ la riĉuloj; li prenis sian krucon sur sin. Prenu ankaŭ vi, proletŝafo, vian krucon; tiam vi reviviĝos kaj sidos dekstre de dio kiel via lumanta idealo — Kristo la laboristo!

Prof. Hartvig.

Al laboristaj korespondantoj-liberpensuloj de ĉiuj landoj!

Por plifaciligi korespondadon kun eksterlandaj laboristaj korespondantoj por nia semajna gazeto "Bezbojnik" (Sendiulo) ni sciigas temojn, interesantajn nian legantaron en Sovetio. Nun ni petas korespondi pri jenaj temoj:

1. Politika agado de eklezioj en burĝaj landoj, konkretaj faktoj, atestantaj kontakton de Eklezio kaj Kapitalo.
2. De kiu eklezioj ricevas monon?
3. Kion la ŝtato elspezas por eklezioj, por popolklerigo, por senlaboruloj?
4. Kiel funkcias religiaj organizoj, kaj per kiaj metodoj ili varbas por siaj vicoj anojn?
5. Kiun influon havas la eklezio sur la ŝtataparaton?
6. Kiujn helporganizojn fondis la eklezioj, kaj ilia agado?
7. Kiel agas religiaj organizoj inter laboristoj, junularo, virinoj kaj infanoj?
8. Pri demando: Religio kaj lernejo.
9. Kiel rilatas la eklezioj al la revolucia laborista movado, al la strikoj?
10. Kiel rilatas la eklezioj al USSR?
11. Kvanto da religiaj organizoj proporcie al ties membroj.
12. Kiel agadas liberpensaj organizoj?
13. Procesoj kontraŭ blasfemuloj.
14. Diversaj statistikaj materialoj rilate al eklezio aŭ liberpensula movado.

Ĉio ĉi devas esti ilustrita per faktoj, ĉar nur tiuokaze ĝi efikos sur sovetian leganton. Al ĉiu korespondanto ni sendos n-ron de nia gazeto, en kiu estos presita lia korespondaĵo.

Nia adreso: Moskvo, Sretenka 10, Redakcio "Bezbojnik", Redaktoro de "Bezbojnik" Scheinmann (Ŝejnman).

AL LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT

El letero ricevita de la Sekcio

Pro kelkaj cirkonstancoj ni ne povis ĝustatempe respondi al vi. Ni salutas la de vi komencatan aferon — eldonon de ateista informbulteno por gazetservo. Ni opinias, ke ĝi helpos nin, provizante nin per eksterlanda materialo, kiu malbone venas al ni. Precipe ni dezirus skizojn pri ĝenerala situacio de eklezioj kaj sektanaj movadoj en eksterlando, plej aktualajn, ilustritajn per faktoj, ciferojn ktp. Ankaŭ estas interesaj por ni viglaj karakterizaj artikoletoj de laboristaj ateistkorespondantoj pri liberpensa proleta movado, saturitaj per faktoj, ilustrantaj agadmetodojn de liberpensul-organizoj. Ni provizos vian bultenon de gazetservo per nia sovetia materialo regule. Baldaŭ ekfunkcios nia informgazetservo ĉe CK de AU, kaj ni liverados ties bultenojn al vi ankaŭ regule. Ĉiujn viajn poŝtelspezojn por sendi al ni viajn materialojn, ni pagos plene, transsendante monon al vi dufoje dum jaro, same ni pagos vian poŝtan peradon por ni. Je la nomo de l' legantaro de "Bezbojnik" ni salutas la sekcion okaze de 11-jara ekzisto de Sovetoj. Ricevinte vian salutleteron, ni deklaras ke sovetia ateistaro ĉiam estis en unuaj vicoj de batalantoj por mondrevolucio kaj nia kunlaboro batala en ateista fronto plisukcesigos, pliproksimigos la mondrevolucion.

Kun ateistaj salutoj al SAT-sekcianaj liberpensuloj

Membro de CK AU
Scheinmann (Ŝajnman).

LA ALVOKO

en "S-ulo" n-o 213 ne havis la deziritan sukceson. Ĝis nun anoncis sian kunlaboron K-doj el jenaj landoj: Germanio, Hungario, Polio, Svedio, Norvegio, Svisio, Sovetio kun Blankrusio, Ukrainio. Aliaj landoj mankas ankoraŭ. Ni denove petegas la sendiulojn en SAT-rondoj vigle kunlabori por nia Sekcio. Pripensu! Se nia entrepreno fiaskus, la liberpensulaj organizoj jam uzante nian lingvon dubus pri la monddisvastigiteco de esperanto kaj forlasus nian movadon. La sampaĝe publikigita letero de redaktoro de rusa gazeto "Bezbojnik" devigas vin al kunlaborego. Pro tio legu la alvokon en "S-ulo" n-o 213 kaj tuj anoncu vian helpon.

NIA POŜTO

5129. Se vi kapablas, traduki la koncernan verkon de Hartvig en bonstilan esperanton, faru tion. Pri via alia propono ni nun ne povas diskuti; mankas ankoraŭ multe da helpantoj. — **8740.** Mono ne alvenis. — **5627.** Bezbojnik alvenis. Mi scipovas iomete la rusan; do sendu ruslingvajn sendiulaĵojn. — **Vaguloj.** Poste la faritaj multekostaj spertoj oni nur laboru per SAT-organizo. Liberpensula paĝo aperos, se eble, monate. La ĉefaĵo estas la gazetservo. — Individuaj leteroj pro poŝtelspezoj kaj tempomanko ne estas respondataj.

TRA ESPERANTIO

Estu ni Sennaciuloj!

La SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo.
(Jarlibro.)

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis. ("S-ulo", Korespondado.)

Mi havas pli ol 100 gekorespondantojn. Mi en speciala kajero enskribas ĉion pri la korespondado, kaj post unu jaro mi povas fari interesan konkludon.

Plej malakurataj korespondantoj estas la angloj: ili ricevinte kion ili petis, mem plenumas nek petojn nek promesojn. Duan lokon okupas la japanoj; ili ankaŭ malbone plenumas promesojn, ili flatas, kun granda ĝentileco ankoraŭ petas kaj promesas. Poste sekvas svedoj, rusoj, francoj. Plej akurate, relative, korespondadas germanoj. Ĉu SAT-ano ne devas forĵeti la naciajn kutimojn? Oni devas korespondadi sennaciece, t. e. nepre, senmensoge. Ĉu objektivaj kaŭzoj kulpas? Vere povas malhelpi cenzuro en blankteroraj landoj, sed ĉu en Britio do severas cenzuro? En Sovetio laŭdire ankaŭ ne ekzistas letercenzuro, sed kiel anarkiano sencenzurecon mi povas imagi nur en senpotenca reĝimo.

Sen respondaj restis rekomenditaj sendaĵoj, laŭ mia esploro en poŝtoficejo ili trafis postlimon. Kion fari, kiel devigi al respondo korespondantojn? Mi skribis al ili ankoraŭfoje, ĝentile petis pri respondo. Mi instruas novajn esperantistojn kaj donas al ili adresojn. Eble necesas aperigi la adresojn de nerespondintoj en "S-ulo" sub titolo "malakuratuloj". El la nomaro en n-o 218 ("Ĉu estas SAT-indece?") al mi ne respondis 5 (Oslo, Montreal, Lisboa, Sofia, Coblain-au-Pont). Kial ili anoncas en "S-ulo"? Eble iu ankoraŭ donos konsilon, por ke ni estu sennaciuloj-korespondantoj. Ĝustatempe ricevita respondo estas grandega propagandilo por la lingvo kaj movado. La malo haltigas kaj tre malutilas nian aferon. Unu grava detalo estu citata krome: multaj korespondantoj, anoncintoj en "S-ulo", hontas uzi la alparolon "kamarado", (K-do), sed uzas aŭ senkoloran "samideano" aŭ eĉ sufiĉe reliefan "sinjoro" (en adreso nepras "S-ro"!). S.

Korektoj. Preserarojn, kiuj erarigas la sencon, en n-o 221 bonvolu korekti: Pĝ. 111, 1-a kol., linio 31 de supre — scieton (anst. societon!); sama pĝ., lasta kol., antaŭlasta linio: areo (anst. aero!); pĝ. 106, dua kol., lin. 17 de malsupre — kunforĝita (anst. kunforiĝita).



9-a Kongreso de SAT
en Leipzig (Germanio)
4.–10. augusto 1929

2-a Komuniko

Kongresaliĝoj. Aliĝiloj estas dissenditaj kun n-o 216 de "S-ulo". Sed nur malmultaj Gek-doj ĝis nun aliĝis. Aliĝoj validas nur, kiam ankaŭ la kongreskotizo estos alveninta, do nur tiam aperos via nomo en "S-ulo" sub rubriko de kongresaliĝintoj.

Ne-SAT-anoj ne povas aliĝi la kongreson. Do, ili antaŭe devas SAT-aniĝi, kaj nur poste ili povos anonci sin kiel kongrespartoprenontoj. Gastoj povos veni, sed ni ne povas garantii por loĝejoj ktp., escepte por familianoj de SAT-anoj, se ili estas anoncitaj.

Kongreskarton post ricevo tuj metu en la membrokarton de SAT! Ambaŭ dokumentoj kune necesas kiel legitimiloj, kiam vi venos al la kongreso. Kiu estas anoncita en "S-ulo" kiel aliĝinto, ricevos sian kongreskarton kun "S-ulo".

Propagando. Jus aperis leterfolioj, kovertoj kaj sigelmarkoj de la 9-a SAT-kongreso. Mendu tuj kaj subtenu tiel la propagandon porkongresan. Sed mendoj nur estos plenumataj, kiam estos alveninta ankaŭ la necesa sumo.

Leterfolioj kun kovertoj kostas po 15 ekzempleroj 0.50 mk. g.

Sigelmarkoj kostas po folio (60 markoj en 3 diversaj specoj) 0.50 mk. g. Ni do vendas por memkostprezo, por ebligi al ĉiu K-d(in)o plej efike subteni la propagandon.

Atentu! Germanioj sendu kongreskotizojn, monon por menditaj propagandaĵoj al: W. Kampfrad, poŝtĉeka konto 13 527. Aliĝilojn kaj mendojn sendu al: K-do Walter Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24. Gekdoj ekstergermaniaj sendu siajn kotizojn kaj monon por menditaj propagandaĵoj per la Adm. de SAT; Sovetianoj per moskva filio de SAT.

Vivkostoj en Leipzig. Ĉar venis jam kelkaj demandoj pri vivkostoj en Leipzig, ni nun — nur koncize — povas informi; detaloj sekvos post kelka tempo en specialaj artikoloj kaj komunikoj. Kostas: 1 ĉambro po nokto en popoldomo 3 mk. g.; matenmanĝo 0.60 ĝis 1.20 mk. g.; tagmanĝo 1.00—2.00 mk. g.; vespermanĝo 0.80—2.00 mk. g.

Kongreskaravanoj. Jam venis demandoj pro kongreskaravanoj. Ni laŭ ricevitaj aliĝoj ĝustatempe komisios K-dojn en elirlokoj de tiaj karavanoj kaj pri tio informos en "S-ulo". Plej necese nun estas, por ke ni havu certan perspektivon rilate al neceseco de karavan-organizado, ke vi tuj aliĝu la kongreson.

Veturprezoj per rapidvagonaro — 3-a klase

Berlin—Leipzig	7.70 mk. g.
Bruxelles—Leipzig	31.90 „
Budapest—(Praha)—Leipzig	36.80 „
Bukarest—(Praha)—Leipzig	67.20 „
Danzig—Leipzig	28.40 „
Düsseldorf—Leipzig	24.60 „
Kehl—Leipzig	27.60 „
Kiev—(Berlin)—Leipzig	56.00 „
Köln—Leipzig	25.40 „
Königsberg—Leipzig	33.20 „
Leningrad—(Berlin)—Leipzig	79.50 „
London—(Ostende)—Leipzig	56.25 „
Malmö—Leipzig	35.80 „
Minsk—(Berlin)—Leipzig	45.65 „
Moskvo—(Berlin)—Leipzig	80.20 „
München—Leipzig	23.20 „
Paris—(Köln)—Leipzig	40.60 „
Praha—Leipzig	15.90 „
Riga—(Königsberg)—Leipzig ĉ.	45.00 „
Saarbrücken—Leipzig	27.00 „
Stettin—Leipzig	15.20 „
Trier—Leipzig	28.00 „
Varsovio—(Breslau)—Leipzig	34.30 „
Vieno—Leipzig	31.50 „
Zürich—Leipzig	34.90 „

La veturprezoj estas parte proksimumaj, sed certe ili sufiĉas, por elkalkuli la veturprezojn el plej multaj lokoj de Eŭropo. (Pri specialaj karavanoj ni ĝustatempe informos).

Informpetojn adresu al: K-do F. C. Richter, Lochmannstr. 2/3, Leipzig O 27, Germanio.

Atentu kaj legu la sekvantajn komunikojn de la K. K.!

1-a listo de kongresaliĝintoj

1	Richard Lerchner, Leipzig, Germ.	90
2	Otto Bässler, Leipzig, Germ.	715
3	Walter Kampfrad, Leipzig, Germ.	2698
4	Adolf Wendt, Leipzig, Germ.	2518
5	Frieda Bässler, Leipzig, Germ.	2276
6	Gertrud Klaps, Danzig, Danzig	11676
7	Fritz Abke, Bischofshagen, Germ.	9896
8	Robert E. Bitzer, München, Germ.	1810
9	Josef Postl, Wien, Aŭstrio	8065
10	Georg Volkert, Nürnberg, Germ.	516
11	El. Kate Limouzin, Paris, Francio	509
12	Norbert Barthelmess, Paris, Franc.	1768
13	William Chisholm, Edinburgh, Angl.	12215
14	Herbert Ward, Burnley, Anglio	6314
15	Isaak Kontoroviĉ, Sverdlovsk, Sov.	7691
16	Petro Ŝubin, Sverdlovsk, Sovetio	6937
17	Richard Jurke, Wiesa, Germ.	6269
18	Charlotte Lerchner, Leipzig, Germ.	2465
19	G. Naumann, Göppersdorf, Germ.	8130
20	Willy Uhle, Chemnitz, Germ.	1399
21	Rudolf Rössler, Einsiedel, Germ.	11297
22	Herm. Nonnenmann, Stuttg., Germ.	511
23	Richard Schinkel, Leipzig, Germ.	135
24	P. Teucher, Ennew.-Glesien, Germ.	10670
25	Josef Batta, Wien, Aŭstrio	246
26	Margarete Batta, Wien, Aŭstrio	633
27	Karl Riese, Leipzig, Germ.	347
28	Elsa Riese, Leipzig, Germ.	4292
29	Walter Enghardt, Leipzig	2512
30	Richard Ebert, Leipzig	4262
31	Eugen Lanti, Paris	1
32	D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ, Kiev	5627
33	Jarko Hoŝek, Zlin	10032
34	Gregoro Demidjuk, Moskvo	1516
35	Remi Cogoluénhes, Nîmes	7995
36	Edmond Liégeois, Orchies	12783
37	Louis Glodeau, Paris	50
38	Simone Tinland, Bures	3792
39	Herbert Muravkin, Berlin	2921
40	Erich Lämmerhirt, Leipzig	84
41	Lily Pul, Liverpool	3210
42	Mary Carey, Liverpool	1170
43	Karl Bremer, Celle	13063

El la Administrejo

Ni atentigas niajn K-dojn en Sovetio, ke sub la hodiaŭa dato ni likvidas niajn subagentejojn en Kremenĉug kaj Minsk, ĉar la rajton pri montranssendo al SAT nur ricevis nia ĉefagentejo en Moskvo. Estonte oni nur sendu ĉiajn monsendojn, destinitajn por SAT, al CK de SEU, Poŝtkesto, 630, Moskvo.

Jam kelkfoje, kaj ĉefe nun dum la lastaj monatoj, nia movado estas finance malhelpata pro la malfacila monricevo flanke de nia Moskva agentejo, kiu bedaŭrinde mem havas malfacilojn sendi al ni regule la monon apartenantan al SAT. Ni jam kelkfoje skribis pri tio en "S-ulo" kaj ni ne volas remaĉi ĉi tiun por ni tre malĝojigan fakton.

Tamen necesas, ke ni trovu vojon, por iomete mildigi ĉi tiun preskaŭ ne plu tolereblan staton. Hodiaŭ ni atentigas niajn membrojn kaj abonantojn, kiuj iel devas sendi monon al Sovetio, ke ili faru tion per SAT. Per tiu procedo vi helpas al nia movado. Jam kelkfoje ni faris tion kaj la koncernuloj certe ĝojis pri tiu simpla kaj malmultekosta transpago. Pri la rapida plenumo de la transpago ni kompreneble zorgos. *Adm.*

La movado en Danio

La Lab. Esp. Grupo Odense aranĝis 2 kunvenojn ĉe la neŭtrala esp. asocio, ĉe kiuj oni pridiskutis la SAT-movadon. Ni i. a. aŭdis eldirojn kiel tiun: "La SAT-movado estas egale danĝera por la esp. movado, kiel la komunistoj por la laboristaro." "Se la Lab. Esp. Grupo de Odense subtenas 'Centra Dana Esp-ista Ligo'-n (neŭtrala), mi tuj aniĝos, sed ne kiam ĝi laboras por SAT!" Se tio estas la opinio de la "simplaj" danaj laboristoj, mi bedaŭrinde kredas, ke daŭros longe, antaŭ ol ni havos grandan lab. esp. movadon ĉi tie. Nia oficiala adreso estas: Dana Esp. Agentejo, Kancellivej, 35, Bolbro, Odense, Danio.

* * *

Ekzistas en Kopenhago lab. esp. unuiĝo "La Unua Majo", kies prezidanto estas K-do Jan Leliveld (SAT-ano 12 703). Antaŭ preskaŭ ½ jaro mi interrilatis kun li, proponante, ke ni fondu danan LEA. Mi ricevis tre interesan respondon; sed poste mi neniam aŭdis de li, kvankam mi skribis al li ne malpli ol 3 fojojn. De alia flanko mi aŭdis, ke li serĉis informojn pri la neŭtrala "Centra Dana Esp-ista Ligo", por anigi sian grupon. Ĉu li eble preferas kunlaboradi kun ĉi tiu burokrata organizo anstataŭ helpi al ni, la "simplaj" laboristoj? Li memoru, ke li samtempe perfidas la SAT-movadon kaj ne rajtas esti SAT-ano!

H. Nielsen (11 082).

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo".

ĈE LA NEŬTRALULOJ

S-ro I. H. Krestanoff en Bruselo

Dum la dua semajno de decembro ni sciiĝis, ke s-ro Krestanoff estis parolonta en diversaj belgaj urboj pri sia amata "demokrata" patrio, kiel li — sen naŭzego — epitetas la sangan nunan Bulgarion. En Bruselo (france: Bruxelles) la 17-an de dec. li aperis en la kunvenejo de la neŭtrala grupo; estis reklamite per radio kaj gazetaro. Ĉar SAT-anoj havas "ion" por demandi al tiu sinjoro, ĉeestis proks. 30 da ili, dum la tuta aŭdantaro nombris 60—70 personojn.

Post tradiciaj salutvortoj de la prezidanto por la gasto, lingva komitatano I. H. Kr., kiel vera nacia propagandisto, prikantis la naturajn allogaĵojn de sia kara patrolando. Li skizis rapidan bildon pri industrio kaj agrikulturo, pri moroj de siaj samlandanoj kaj pri la kulturinstitucioj. Post tio ja oni sin demandas, kial atendas la tuta mondo por bulgariĝi!

Pri la esp. movado li sciigis, ke dank' al ministra malpermeso de esp-o en lernejoj, la movado ricevis novan antaŭenpuŝon. Parolante pri la bulgara ŝtato, li senhonte kuraĝis diri, ke ĝi estas demokrata lando, kie ĉiu sin sentas libera! Tiu aĉulo, kiu iam en "S-ulo" skribis pri "veno de tago de l' repago" elpropagando. J. W.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

FRANCIO. Lab. esp. movado en Alsaco-Lotaringio tute ne ekzistas. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam en Strasburgo laboris multaj eksterlandanoj, estis inter ili esp-istoj, kiuj kreis la lab. grupon "Heliozo". Post ilia foriro sekve de senlaboreco restis nur malmultaj membroj de SAT. La propagandaj eblecoj estas preskaŭ nulaj. Nun fine montriĝas ŝancoj enradikigi esp-on ĉe la naturamika movado, la sola medio, kie sukcesa laboro estas antaŭvidebla. La du kom. gazetoj ignoras ĝis nun esp-on malgraŭ sistema al— **JUGOSLAVIO. Bos. Brod.** Esp. Societo "Stelo" malfermis en nov. du kursojn por komencantoj. Unu kurso sub gvido de K-do F. Homar kun 25 p., alia en gimnazio (Brod s/S.). Pro politikaj cirkonstancoj estas malfacile labori. (10 568.) — **SOVETIO. Novorossijsk.** 30. nov. du mondvojaĝantoj-biciklistoj vizitis nian urbon (K-doj Posern k Peraire). Ili parolis en div. kluboj pri siaj vojaĝimpresoj. Ĉie ili estis akceptataj fratece kun entuziasmo. Ili nun disiĝis: K-do Posern daŭrigis la vojaĝon 6. 12. laŭ vojo Batum, Baku — Persion. K-do Peraire restis ĉi tie k laboras en aŭtomobilejo. (5772.)

Kelkaj konsideroj pri evoluo de l' esperanta lingvo

(Fino)

Kelkiuj povas ektimi, ke tiela evoluo estas danĝera por nia lingvo, kaj oni devas kontraŭbatali ĝin. Tia kompreno estas tute erara. Kvankam la kvanto da radikoj iom pligrandiĝas, tamen la kvanto da vortoj lernotaj neniel pligrandiĝas, ĉar tutegale la lernantoj devas studi la signifojn de l' arbitraj kombinoj. Eble estas pli facile studi la kombinojn de la jam konataj radikoj, ol novajn radikojn, sed penante atingi pli grandan facilecon, ni malgajnus pli, ol ni gajnus. Ni malgajnus iagrade fleksneblecon kaj kompreneblecon de nia lingvo, ni ne plene eluzus la riĉecon de ĝia strukturo, sed male per arbitraĵoj farus esceptojn en la uzado de afiksoj, komplikigus la lingvon. Do ni povas konstati, ke la evoluo iras ĉi direkte racian kaj saĝan vojon.

Nun kelkaj vortoj pri la afiksoj kun kelkaj signifoj. Oni ne devas miksi multsignifecon kun larĝsenceco. Larĝsenca afikso kreas ideojn kun larĝa enhavo, sed multsignifa afikso estas uzata diversfoje jen por unu celo, jen por alia, kaj la afikso en diversaj kombinoj havas malsaman sencon. Tiaj afiksoj ekzemple estas **id**, **uj**, **re**. Sufikso **id** estas uzata ĉu por nomi junajn bestojn (kokido), ĉu por nomi familian rason (Izraelidoj). Se ĉi foje miskomprenoj ne povas preskaŭ okazi, la samon oni ne povas diri pri la famekonata sufikso **uj**. Kaj ni vidas, ke la evoluo forprenas de ĉi tiu sufikso ĝian multsignifecon, lasante nur unu signifon precizan. Kiel konate, Zamenhof donis al ĝi oficiale tri signifojn: por frukta arbo, por lando kaj por objekto, en kiu estas konservata io. Por esprimi la fruktan arbon, oni jam delonge ne uzas ĝin. Kombinoj kun "arbo" (pomarbo) estas bone esprimantaj la ideon. Por landoj oni ankaŭ ĉesas ĝin uzi spite la penoj de la Akademio haltigi la naturan kaj racian evoluon, donante al nomoj de landoj internacian formon: Rusio, Germanio ktp. Do restas nur la lasta kaj sola signifo de **uj**. Similan proceson ni observas kun la prefikso **re**. Ĝi havas du signifojn 1. ripeto de iu ago kaj 2. reveno al deira punkto. Nun por la dua signifo oni jam tre ofte uzas prefikson **retro**.

Pruvon pri plua precizigo de afiksaj signifoj ni ankaŭ vidas en la ekzemplo de sufikso **um**. Zamenhof diras en la Ekzercaro: "La sufikso 'um' ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun 'um' oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo." Do, la Zamenhofa signifo donita al la sufikso **um** estis tieldire foresto de ia preciza signifo. Sed iom poste oni inklinis uzi **um** por esprimi komprenon pri "kovri iun objekton per" aŭ "provizi iun objekton per", kiel "elektrumi, orumi, arĝentumi" ktp. Ni vidas, ke la evoluo saĝa enkondukis vere necesan sufikson **iz** por esprimi ĉi tiun ideon: elektrizi, orizi, arĝentizi. Tiamaniere la sufikso **um** rericevis sian Zamenhofan plej vastan larĝsencecon kaj liberiĝis de la altrudita dua senco. Tiu ĉi procedo estas "precizigo" de la sufiksa signifo, ĉar kun altrudita senco, la sufikso jen havis ian signifon precizan (orumi), jen ne (kolumo), t. e. estis dusenca.

Konklude: en la regiono de vortfarado pere de afiksoj la evoluo de l' esperanta lingvo, rezultanta el kolektiva laboro de uzantoj la lingvon, kondukas al plua pliriĉigo de esperanto kaj plua klareco de penso esprimata per ĝi. Ni povas esti trankvilaj pri la venonta sorto de nia lingvo. La evoluo iras la ĝustan vojon. (641).

parolis tiujn hipokritaĵojn sen ia plej eta haŭtruĝiĝo!

Fininte li petis, ke oni demandu lin, ĉar eble li forgesis paroli pri interesaj punktoj. Efektive, li silentis pri afero interesega por granda parto de la ĉeestantaro, kaj K-do Van Aelst starigis la demandon pri la forkuro de la sinjoro el la redaktejo de "S-ulo". Li diris, ke se la formo de la parolado povis utili por pruvi la uzeblecon de nia lingvo, li kaj liaj amikoj ne povas konsenti kun pluraj partoj de la enhavo. Tamen la lab. esp-istoj ne venis por refuti dirojn de Kr., sed por peti de li klarigon pri la akuzoj publikigitaj en "S-ulo" (24. nov. 1927) kaj dum SAT-kongreso en Göteborg, de K-do E. Lanti: 1. Kr. kredigis, ke li konvertiĝis al klasbatalo nur por ke SAT pagu duonon de lia vojaĝo de Sofio al Parizo. 2. Kvankam estante subskribinta sesmonatan kontrakton li senaverte forlasis la laboron antaŭ la fino de tiu periodo. K-do V. A. petegis, ke li donu klarigon pri tio kaj substrekis kun forto: se vi tion faris, ĉiu honestulo kondamnos vin, kaj ni konsideros nian devon averti la bruselan esp-istaron, por ke ĝi ne fariĝu viktimo de aventurulo, de parazito de esp-a movado. La skandalo estis granda kompreneble, kaj la gesinjoroj estis konsternitaj.

Klare respondi estus tro penige! S-ro Kr. preferis ruzi kaj minaci! "Iam, je la taŭga momento (?), mi publikigos cirkuleron pri la SAT-kulisoj, kaj tiam vi vidos, vi la ŝafaro, kiel agas la SAT-Direkcio. Mi konigos, kiel SAT malhelpas la disvastigon de la espismo. Ĉe "S-ulo" mi estis nur teknika redaktoro. Mi — diris la ulo, frapante sian bruston kaj kun emocia voĉo — mi forlasis mian profesion por flugi al savo de "S-ulo", kiu estas bonega gazeto (dankon, s-ro, pro la laŭdo!) kaj kiu ploris pri lingvosperta redaktoro, dum ĝia estro, ŝtatlaborulo, atendas trankvile sian pension ricevotan post kelkaj jaroj!"

Al K-do V. A. petinta permeson (ne ricevitan) por laŭta legado de artikolo de s-ro Kr. en "S-ulo", li respondis, ke li verkis tion "por pruvi, ke esp-o povas servi por ĉiuj aferoj", kaj ke cetere li subskribas siajn artikolojn per sia nomo, dum la estro de "S-ulo" uzas pseŭdonimon por "ataki la ŝtaton, kies panon li manĝas"!

K-do V. A. fine konstatis, ke li ne respondis pri la akuzoj. Li esprimis sian bedaŭron, ke s-ro Kr. tiel longe atendas por diskonigi la SAT-kulisajn misterojn! Post demando de iu brikkolorita riĉulino pri ebleco de aŭtomobilveturado en Bulgario, la burĝoj kantis "La Esperon", dum ni foriris, funde konvinkitaj, ke ni troviĝis antaŭ fripono!

Kr. ankaŭ diris, ke je nia granda plezuro, ke jam same li estis atakata de K-dino France en Manĉestr (angl.: Manchester) kaj ke kredeble li ankoraŭ spertos tion aliloke. Ni tuj certigis al li, ke ni agos, por ke li havu la "plezuron" plue renkonti SAT-anojn dum sia vojaĝo. M. Van Aelst.

NIA POŜTO

Al K-doj el Hungario. — Ni bonakceptis k legis kun intereso viajn klarigojn k pravigojn. Ni plene konscias, ke vi laboras en tre malfavoraj cirkonstancoj k sekve opinias, ke oni ne devas plimalfavorigi ilin per polemikoj nepre evitendaj.

Vienanoj. — Ni petas Vienan Junk-don socialistan sendi al ni iom da materialo (povas esti germanlingva) pri preparaj laboroj al Kongreso de Soc. Junular-Internacio okazonta ĉi somere en Vieno, aŭ doni kelkajn informojn esp. lingvajn pri dato ktp. Kiu emas zorgi pri reprezentado de SAT ĉe tiu Kongreso? Skribu al red. adreso. N. B.

13 059. — Vian proponon vi devus submeti al la venonta SAT-Kongreso.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

The Shop Assistant, Lond., 15. 12., Tuteŭropa mov. (215), Travail, Lyon, 15. 12., Kapit. super Afriko (216, ekstrakte). Estonta Ŝanĝo, Dnepropetrovsk, 3. 10.

Priesper. artikol. k notojn enhavis:

Daily Herald, London, 14. 12., D. Deutsche Eisenb., Berl., 9. 12., Signalen, Stokh., 13. 12., Kristnaska spec. n-ro (en ĉi lasta tre bona artik. de K-do Eriksson en esp-o) Dresd. Volkszeitg., Dresden, 7. 12., 14. 12., 15. 12. (artik. por memoro de Zamenh.), Les Amis de la Nature, Strasbg., okt., Majbutnja Zmina, Dnepropetrovsk 2. 9., 5. 9., Stelo, Dneprop., 10. 7.

Pri la SAT-Kongr. raportis:

Majbutnja Zmina, Dnepropetrovsk, ?, The Daily Worker, N. Jorko, 28. 9.

Peresper. materialon enpresis:

Die Einheit (Unueco), Wien, dec., Zvezda, Dnepropetrovsk, 7. 11.; Laborista Voĉo (Arbeiterstimme), 1. 11., let. de telegrafisto el Naĥiĉevan; 7. 11., let. de ruĝarmeanoj el Sretensk; 7. 11., let. de komjunularo el Samara; 23. 11., el presservo (ateista artikolo).

LA MULTKOLORAJ, ILUSTRITAJ POŜTKARTOJ DE SAT

estas haveblaj ĉe la Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

GEKAMARADOJ!

SAT, SEU, komunistaj k komjunulaj ĉeloj, Esp. redakcioj, sportuloj, sendiuloj, Ruĝhelpanoj, PTT-istoj k aliaj!

Meze aŭ fine de januaro en nia klubo de PTT-istoj estos aranĝata

GRANDEGA ESPERANTA VESPERO

kun esp. programo k grandioza esp. ekspozicio, kiu konsistos el fakoj: 1. nia tutmonda esp. movado, 2. laborista vivo en ĉiuj landoj, 3. MOPR-laboro, 4. esp. presaĵoj, 5. esp. literaturo, 6. nia lab. korespondado, 7. esp-o k scienco, 8. esp. muziknotoj, 9. naciaj esp. lernolibroj, 10. div. esp. afiŝoj, folioj, propagandaĵoj, agitaĵoj, diagramoj ktp., 11. esp-o k foto-amatoroj. — Sendu al ni multan materialon por ĉiuj fakoj. Ne forgesu sendi salutlet. k esp. muziknotojn por div. orkestroj k kunkantoj.

Transpresigu tiun ĉi anoncon en aliaj ĵurnaloj. Sendu baldaŭ materialon al: **Tomsk,** Siberio, Klubo de PTT-istoj.

Leginda, nepre leginda estas

Prozo Ridetanta

Noveloj originale verkitaj de Raymond Schwartz.

—o—

Prezo: 3 mk. g. inkl. la sendkoston.

Havebla ĉe Administrejo de SAT.

Sveda Lab. Esp. Asocio

serĉas kapablan, instru-talentan K-don SAT-anon, kiu povus per rekta instrua metodo en Göteborg — eble ankaŭ aliloke en Svedio — fari esp-ajn kursojn. Plej bone, se senlabora K-do povas serĉi, kiu ne devas oferi tro multe. Ni povas ne promesi pagon multe pli ol vojaĝon kaj senpagan loĝejon, manĝon. K-doj, kiuj sin anoncas, devas noti pri siaj postuloj rilate pagon. Atentu, ke ili ankaŭ devos agiti por SAT kaj lab. esp. movado! Skribu al: Sveda Laborista Esperanto-Asocio, Box 73, Göteborg, Svedio.

Niŝni-Novgoroda Ŝtata Universitato

Gelaboristoj! Komunistoj!
Junkomunistoj! Studentaro!
Liberpensuloj! IRH-anoj!

Gestudentoj de N.-Novogoroda Ŝtata Universitato volas aranĝi regulan korespondadon kun Gek-doj el ĉiuj landoj; skribu kolektive aŭ individue. Ĉiuj nepre ricevos respondon.

Adresu: K-do A. Kalaŝnikov, **Niŝni-Novgorod,** Gotmanovskaja 9, kv. 9, por Esperanta rondeto. USSR.

IRH-ĉelo ĉe Administrado de apotek-entreprenoj dez. koresp. kun similaj ĉeloj k grupoj kĉl. pri lab. vivo k movado, laborsperto ktp. Adr.: Ĥarkovo. Aptekonpravlenie. Graĵdanskaja 17. Jaĉjekje MOPR-a.

Peto pri helpo

Post 10-jara servo en poŝta fako mi estis denuncata al polico k arestata, poste forpelata el la servo, tiel ke mi restas kun familio (3 filetoj) en mizera stato. Ne povante trovi en faŝista Litovio iun oficon aŭ fizikan laboron, mi estas devigata, kiel multaj aliaj proletoj ĉi tie, elmigri Sudamerikon. Sed mi ne havas rimedojn, por prizorgi la necesajn dokumentojn k miajn infanojn. Gek-doj, kiuj bonvolos prunti laŭpove moneron, estu certaj, ke mi post reboniĝo de miaj kondiĉoj dankeme redonos. Kun antaŭdanko: Zigmas Malaŝauskas, XIII Kranto g-vé 2 nr., Kunas-Ŝanĉiai, Litovio. SAT-ano 6089.

PROPAGANDAFIŜOJN

ni dez. interŝ. por ĉerpi el ili novajn ideojn pri la propag. de esp-o inter la Laboristaro. Ĉefe nin interesas bild-afiŝoj en ajna lingvo. Taŭgan ŝanĝmaterialon garantias la propag. fako de "Hungaria Esperantista Societo Laborista" Jozef-krt. 9, **Budapest,** VIII. (Hung.).

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

Tutmonda infanaro, atentu!

Militsporta grupo kaj esperanta rondeto ĉe junpionira klubo "Bolŝevikidoj" komencas interligon kun junulaj kaj pioniraj grupoj de la tuta mondo. Por plensukcesigi la laboron, sendu abunde L, Pl, gazetojn, ĵurn., salutleterojn. Neniu restos sen respondo!

La adreso: USSR, **Kiev,** Marksa str. 4, klub. "Bolŝeviĉenjata" aŭ **Kiev,** ul. Rariĵskoj Komuni, 6, 24, al K-do J. Braginski.

ENHAVO:

	paĝo
La amerika danĝero	113
Vizito ĉe Tom Muni	114
Faktoj kaj komentoj	115
Diskutejo	115—116
Sennaciula liberpensula paĝo	117
Tra Esperantio	118—119
Kelkaj konsideroj pri evoluo de l' esperanta lingvo	119
Anoncoj	120

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)